

## Tria informilo (11.11.2024)

---

Bonvenon al la silvestra renkontiĝo de Germana Esperanto-Asocio, ĉi-foje en Bielefeld ! Hodiaŭ ni sendas ankoraŭ kelkajn informojn ĉefe por tiuj, kiuj jam aliĝis. Iliajn nomojn vi trovos en la respektiva rubriko de la GEA-retpaĝo [www.esperanto.de](http://www.esperanto.de). En la nuna momento ankoraŭ restas liberaj lokoj, do ne hezitu alparoli, informi kaj inviti geamikojn.

### Alveno en Bielefeld

Bielefeld estas facile atingebla per aŭtoŝoseoj kaj fervojo. La plej proksimaj aviadejoj estas Hannover kaj Düsseldorf. Ni kunvenos en la junulargastejo (Jugendgästehaus), Hermann-Kleinewächter-Str. 1, 33602 Bielefeld, Tel.-Nr. +49(0)521-52205-0.

**Por aŭtomobilistoj:** venante el la urbocentro tiu strateto troviĝas ĉe la fino de Nikolaus-Dürkopp-Straße. Vi povos dum mallonga tempo halti antaŭ la domo por senŝarĝigi vian veturilon, sed la junulargastejo ne havas propran parkejon. Eblas trovi senpagajn lokojn laŭlonge de la apudaj stratoj (Webereistr., Spinnereistr., Helmholtzstr., Ravensberger Str.).

**Se vi alvenas trajne:** de la ĉefstacio Hauptbahnhof prenu la tramon n-ro 3 al direkto Dürkopp Tor 6. La tramo tie estas subtera kaj signita per U. Veturu tri staciojn ĝis la finstacio Dürkopp Tor 6, kiu troviĝas tuj apud la junulargastejo. La unua komuna manĝo estos inter la 18:00 kaj 19:00 h. Klopodu alveni antaŭe !

**Kontakttelefono** de nia ĉefa respondeculo Andreas Diemel (el Germanio): 0800-3363636-64.

### Endoma Programo

Kiel kutime ni havos plenan programon. En la kadro de Luminesk' denove okazos la Internacia Vintra Universitato (IVU), jam la 16-a sesio) sub gvido de prof. Amri Wandel. Li mem prelegos en du partoj pri "Astronomio por scivolemuloj". Prof. Ilona Koutny ofertis tri prelegojn: "Pri kio ni parolas kaj kiel", "Esperantlingva bildo de la mondo" kaj "Mondo, vortoprovizo kaj vortaroj". Joel Fontaine parolos pri "Lumo kaj sano". Christof Roether prezentos la "Specialan relativecan teorion". IVU estas iniciato de la Akademio Internacia de Sciencoj (AIS) simila al la Internacia Kongresa Universitato dum la UK, kun popularnivelaj prelegoj.

Krome Ulrich Brandenburg parolos pri "Limoj de konfliktpreventado", Christiane Oetter pri fabeloj kaj Hamza Salam pri homaj rajtoj en Pakistano. Barbara Brandenburg prezentos la firmaon Dr. Oetker kaj ĝian historion, Guido Brandenburg la kantpoeton Hannes Wader el Bielefeld. Tri fojojn kunvenos paroliga Esperanto-kurso sub gvido de Kristin Tytgat. Vespere koncertos "La perdita generacio" kun Tomio kaj Hendjo el Svedio, Ĵenja kaj Lena ("Ĵele"), kaj kantigos nin Conny el la apuda regiono Lippe. Elke Lies enkondukos nin en rido-jogon, Sebastian Hoffmann gvidos la novjaran promenadon al la fortikaĵo Sparrenburg. Unu vesperon ni denove dediĉos al la lando kaj urbo de la venonta Universala Kongreso. Ĉiun vesperon post la programo eblos neformale kunsidi en klubejo rezervita por ni.

### Ekskursoj

Tuttaga (kaj relative multekosta) ekskurso ne okazos. Vi havas elekton inter pluraj ofertoj. Ĉiuj kondukas al celoj en Bielefeld atingeblaj per tramo aŭ eĉ piede. La ĉefa ekskursotago (sen paralela programo) estos lundo, la 30-a de decembro:

09:30 - 12:00 h      gvidado tra la malnova urbocentro (prezo: 5 €)

13:00 - 17:00 h vizito de la entrepreno Dr. Oetker kun provmanĝado kaj kunportaĵoj (prezo : 17,50 €)

Krome estas planataj du paralelaj ekskursetoj ĵaŭdon, la 2-an de januaro:

13:45 - 16:00 h gvidado tra la Historia Muzeo de Bielefeld: aparte interesa estas la industria historio. (prezo: 10 €)

samtempe vizito al la socialaj institucioj de Bethel fonditaj en la 19-a jarcento de pastro Boldelschwingh (prezo: 8,50 €)

**Por la ekskursoj vi povos pagi surloke. Tamen, ĉar kelkajn el la programeroj ni devas mendi longe antaŭe, ni petas jam nun elekti ekskurso(j)n kaj informi nin pri via elekto. Sufiĉas mallonga retroŝta mesaĝo al [luminesk@esperanto.de](mailto:luminesk@esperanto.de).**

### **Kaj se vi eble ankoraŭ ne aliĝis al Luminesk'**

Aliĝu plej facile per la retpaĝo de GEA ([www.esperanto.de](http://www.esperanto.de)), sed eblas ankaŭ papere. La nun valida kotizo estas 585 € por restado en dulita, 730 € por restado en unulita ĉambro. Nemembroj de GEA loĝantaj en Germanio pagos aldone 30 €. Aliĝo validas post ricevo de antaŭpago. Pagu al la konto de Germana Esperanto-Asocio, IBAN: DE53 5085 1952 0040 1158 42 ĉe Sparkasse Odenwaldkreis, BIC: HELADEF1ERB aŭ per la UEA-konto geaa-n. Kaj ne forgesu ĝiri la restsumon ĝustatempe antaŭ komenco de la aranĝo. Ni rekomendas aliĝi baldaŭ, ĉar post la 25-a de novembro GEA devos redoni ne bezonatajn ĉambrojn por eviti finanĉan perdon.

### **Ĝis revido en Bielefeld!**

*La organiza teamo: Andreas Diemel, Barbara kaj Ulrich Brandenburg*